



ORIENTA STELO

Julio/July 2013



Orienta Esperantista Federacio
Originale fondita en aprilo 1932

Eastern Esperanto Federation
Originally founded in April 1932

Kontaktdetaloj

Roy Threadgold
Ben Gosling
Barrie Murphy
Mark Drake

Prezidanto 01371850481
Sekretario 01787247737
Kasisto 01702472193
Komitatano 02085188094

roy@boydellsdairy.co.uk
benjamin.gosling@btinternet.com
celiaandbarrie@tiscali.co.uk
marko.drejko@gmail.com

Tiuj kiuj ricevas OS rete, ricevas ĝin pli frue, kaj samtempe la Federacio ŝparas la poŝtkoston. Ĉiuj gajnas! Nur bezoniĝas informi al Roy T. pri via retadreso.

Ĉu ili dormas? Preĝas? Ne! Kредu aŭ ne kредu, ili studas.



Denove Barrie, okaze de nia federacia jarkunveno, sukcesis tordi kaj turmenti la cerbon de la ĉeestantoj per tradukludo de unu el la konversacioj en 'Conversational Esperanto' de Don Lord.

Jarkunsido:

- Pardonpetoj pro necĉesto de Joyce Bunting kaj Bernice Scott.
- Okazantaj aferoj - neniuj.
- Elekto de funkciuloj: La samuloj restas en la Komitato. Tamen, kaj la Prezidanto kaj la sekretario intencas ne servi post la venonta jarkunveno.

• Prezidanta Raporto - li anoncis, ke ĉi tiu estos lia fina jaro de prezidanta servo. Li raportis pri lia vizitoj al la Anglo-European School ĉe Ingatestone, kie li prelegis al ĉ. tricent 17/18 jaraĝuloj kaj al Hillview School ĉe Tonbridge kie li alparolis al ĉirkaŭ 80 pli junaj studentoj. Li poste instruis ilin laŭ grupoj de sep aŭ ok. Li perceptis multe da entuziasmo inter ili.

- Kasista raporto – ni ankoraŭ vivas!
- Sekvis diskuto pri estontaj kunvenejoj. Roy promesis eltrovi pri eblecoj en Marks Tey. Ankaŭ, diskuto pri la traduko de la turista broŝuro de Layer Marney Tower.

La fina programero estis la spektado de viddiskoj esperantaj.

SOMERA AGADO - Dimanĉon la 18a de aŭgusto

Vizito al la Kastelo Hedingham

Ni kunvenu ĉe la kastela pordo je la 11a atm. Vi rajtas aŭ porti piknikon aŭ manĝi en la kafejo en la kastela turo mem.

Antaŭ multaj jaroj tradulis la flugfolion Arthur Campen kaj Peter Oliver. Eble iu jam posedas la tradukon? Se ne, ni faru novan!

Visit to Hedingham Castle

Let's meet at the entrance to the castle keep at 11 a.m. Bring a picnic or eat in the keep cafe.

Single Adult £7.50
Child / Concessions £5



La kastelo situigas en la vilaĝo Castle Hedingham.
Se iu volas veturi trajne, bv kontakti min kaj mi provos aranĝi renkontiĝon ĉe iu stacidomo.

Presidantaj notoj

Karaj Gefederacianoj

Mi pardonpetas pro la malfrua eldono de ĉi tiu bulteno, sed mi ne sukcesis redakti ĝin antaŭ ol ekiri islanden por ĉeesti la Universalan Kongreson. Tiel min nun sidas kaj tajpas en grandega kaj luksa vitra koncerthalo, Harpa, en Rejkjaviko. Ne nur mi plenigas ambicion longdaŭran viziti ĉi tiun landon, sed mi ĝojas ankaŭ eskapi la varmegon ĉeheiman. Ĉi tie ni spertas 12-15 gradojn, kun iom da pluveto kaj etetan iometon da suno!

Por mi estas privilegio pasigi semajnon en esperantio mem. Ŝajnas ke krokodiloj apenaŭ povas toleri la etoson de UK. Ho se nur niaj federaciaj kunvenoj estu tiel! Kiel forigi krokodiladon? Mi proponu kelkajn sugestojn:

*Ne timu paroli simple ĉar vi ne kapabls paroli flue. Ni ne hezitas murdi la anglan, sammaniere ni devus ne timi tordi esperanton (aŭ eĉ iun alian lingvon). Vi povus surprizi vin pri kiom oni povas esprimi per malampleksa vortprovizo. Mi memoras kiel, en Hispanujo, mi sukcese eksplikis per mia dudeko da vortoj hispanaj, al neanglohavanta stabano, ke mia edzino kaj filino staras kun rulseĝo sur la kajo de subtera fervojo antaŭ nefunkcia lifto - tute ne antaŭatendita okazaĵo - sed ĝi eltiris la ĝustan respondon!

*Uzu simplajn vortojn eĉ se ili ne estas precize tiuj kiujn vi serĉas. "Kamiono" povus esti "granda aŭto", ekzemple.

*Respondu al krokodiloj ĝentile sed **ĉiam esperante**; eĉ la plej granda krokodilo povas kompreni simplajn vortojn zorge parolatajn.



Mi esperas vidi vin ĉe la kastelo Hedingham.
Ĝis tiam
Roy T.

Postnoto: Post la unuaj du tagoj, la vetero multe pliboniĝis kaj la suno briladis dum la tuta tago (kaj preskaŭ la tutan nokton).

***Mi tute ne kuraĝis provi
ĉi tiun islandan trinkaĵon!***

Dank al Roy Simmons, ni nun havas nian propran federacian retejon; kontrolu ĝin ĉe <http://www.greenrats.org.uk/oef.htm>

Enigma angulo:

En la franca ĝi estas '*esait nrulo*', hispane, '*eaosr nidlc*', kaj germane '*enisr atdhu*'
Kio ĝi estas en Esperanto?

Por la solvo, nepros aŭ veni al Kastelo Hedingham, aŭ atendi la sekvan OS (se mi memoros!).

Lia moŝta hundo Fred ferias ĉi monate, nur pro spacomanko.